# ESPERO KATOLIKA

*monata revuo fondita en 1903*

**JARKOLEKTO 68 n. 619**

**n.ro 7-8** **Julio-Aŭgusto 1971**

## « SURVOJE AL EKUMENISMO »

### La fundamentoj de la dialogo.

La dialogo estas necesa por la homo, por lia persona riĉiĝo, por lia serĉo de la vero kaj de la bono kaj por lia respondeco antaŭ la societo, kiun li apartenas.

Interna kaj natura forto devenanta de la Kreinto portas la homon renkontiĝi kun aliaj, alvokitaj — ĉiu laŭ sia ebleco — transformi kaj plibeligi la mondon, kiun Dio liveris al la homo.

Supernatura graco, kiel interna impulso kondukanta al la savo, trovas ordinare motivon ekstere en paroloj kaj ekzemploj plenaj de energio kiu transformiĝas en lumon por la menso kaj en forton por la volo. Nei la eblecon de la dialogo signifas nei tion, kion nature kaj supernature Dio metis en la homon kiel fundamenton de lia digneco kaj grandeco; signifas nei la eblecon de la homa menso kaj koro celi la veron kaj la bonon.

La dialogo ne estas facila. Psikologiaj, sociaj kaj moralaj faktoroj fariĝas kelkfoje baro, kiu malhelpas la animan renkontiĝon.

Oni restas en sia loko, oni rigardas sin reciproke sen akcepti la alian.

La kritiko, kiu devus prepari kaj direkti la dialogon, fariĝas malaprobo kaj malkonstruo kaj malestimo.

Oni kredas sin sufiĉe riĉa, sed kiel la mono sen uzo ne rensas, tiel ĉiu bono, kiun la homo posedas kaj egoiste konservas, ne disvolvas lian riĉiĝon.

Kelkfoje oni timas danĝeran ŝanĝon akceptante alian homon, aŭ oni timas la nekonatan taskon, kiun la dialogo faras evidenta.

Ni devas krome diri, ke iuj formoj de la ideologia propagando, iuj politikaj reĝimoj, iuj sociaj condiĉoj malhelpas eĉ la komencon de la dialogo.

La malkonfido post malpozitivaj spertoj estas dinamito, kiu krevas kiam oni komencas proksimiĝon kaj malhelpas ĉium amikecon kaj dialogon.

Kiam ni dialogas, ni donas kaj ricevas.

Ni devas senti, ke por vivi kaj kontribui al la vivo de la homa familio necesas rilato, interŝanĝo. Tiel naskiĝas la konvenko, ke ni estas malriĉaj, ke ni riĉiĝas per la sperto de aliaj; aliflanke ni donas bonvole al aliaj la bonon, kiun ni posedas. Tiu formo de rilato postulas profundan kaj sinceran aŭskultadon, kiu permesos al ni penetri la animon de la interparolanto, esplori liajn sentojn, venkante ĉiun antaŭjuĝon, por kompreni ilin.

La Papo Paŭlo VI en la encikliko « Ecclesiam suam » diris: « Antaŭ ol ni parolas, ni devas aŭskulti la voĉon, eĉ la koron de la homo ».

Se ni ne atingas la koron kaj ne interpretas la sentojn, la homa voĉo

de la homo resonos en niaj oreloj, sed ne trovos internan akcepton. Tamen oni ne devas nepre cedi antaŭ la vero; ankaŭ la simpla malpliigo de la vero por kaŝi neagrablajn aspektojn ne estas bona.
Nur oni povas serĉi en la eraroj de la interparolanto kiom da vero estas trovebla, ĉar ne ekzistas la absoluta eraro; tiu parteto da vero estas renkontpunkto kaj oni devas estimi ĝin, por ke komenciĝu viva kaj utila dialogo. *(daŭrigota)*

---

El Romo, centro de la katolika mondo, kelkaj informoj pri la vivo kaj agado de l'eklezio:

## LA PAPA VORTO

LA APOSTOLA LETERO « Oktogesimo adveniens anno » (okaze de la Okdeka datreveno), kiun Paŭlo VI adresis al kard. Maŭrico Roy, prezidanto de la Konsilio de Laikuloj kaj de la papa komisiono « Justeco kaj Paco », estas grava dokumento pri la socia doktrino de la katolika eklezio. La letero celebras tiamaniere unue la datrevenon de la encikliko « Rerum novarum », aperinta la 15-an de majo 1891-a, en kiu papo Leono XIII unua majstre alfrontis la socian problemon, sub la lumo de la doktrino de Kristo. Ĝi estis baza ŝtono, sur kiun la eklezio konstruis iom post iom, disvolvante la doktrinon laŭ la postuloj de la tempoj. La encikliko de Leono denuncis « la maljustecon de la laborista kondiĉo en la naskiĝanta industria socio », kaj samtempe prezentis la unuan sisteman tutvidaĵon en la historio de la kristana doktrino, koncerne la ekonomian kaj socian vivon. Pio XI en la 1931-a per la « Quadrigesimo anno » pluiris en la instruado pri la socia justeco celante ordigon de ŝtata ekonomïo » rilate al komuna bono; Johano XXIII en la 1961-a per encikliko « Mater et Magistra » donis kriteriojn por armoniigi laŭ justeco la ŝtatajn progresajn ekonomiojn ĝis monda skalo. Kaj Paŭlo VI en « Populorum progressio » pritraktis la temojn de la internacia solidareco, kiam la socia problemo fariĝis tutmonda. Okazis intertempe la Koncilo, kaj « Gaudium et Spes » metis la bazojn por la papa komisiono « Justeco kaj Paco ». Ĝuste al kard. Roy, ĝia prezidanto, estis adresita la papa letero, kiu, diference de la aliaj dokumentoj, ne estas encikliko, kvazaŭ por doni direktivojn al kompetentaj lokaj paŝtistaj organoj, kiuj pristudos ĝin por la konkretaj aplikoj. « Ĉar estas fakte malfacile doni unikan orientiĝon kaj proponi solvojn universale efikajn, apartenas al la kristanaj kolektivoj, — diras la papo en la kvara paragrafo de la letero — analizi objektive la situacion de siaj landoj, pri-

lumi ĝin per la neŝanĝeblaj vortoj de la evangelio, atingi principojn, juĝkriteriojn kaj agadliniojn laŭ la socia instruado prilaborita de la eklezio dum sia historio ». La papa letero dividiĝas en tri partojn: du el ili ĉefe konstatas la diversajn situaciojn, la tria estas esplicite orientiga. Ĉi tie ni mencias nur kelkain punktoin el la 52 paragrafoi de le letero. En sia enkonduko ĝi apelacias al postulo de pli granda socia justeco, ankaŭ por diversaj situacioj de la eklezio en la mondo. Fakte la eklezio ricevis specifan mesaĝon por la homaro, kaj kapablas por ĉiu socia problemo proponi la solvon, laŭ la evangelia vorto. La zorgoj de la eklezio koncernas la problemojn de urbanismo, ofte okazo de morala malekvilibro kaj malriĉeco ĉe larĝa parto de la loĝantaro; al ĉi tiu suferanta homaro la eklezio ĉiam en la pasinteco, kaj eĉ pli hodiaŭ klopodas servi kaj helpi. Aliaj zorgoj estas por la situacio de la junularo kaj de la virino, problemoj streĉitaj de la urba kaj de la industria vivo. Aparte gravaj en la dokumento estas la instruoj, kiuj rilatas la laboristojn, socia klaso kiu pli kaj pli akiras konscion pri sia digno kaj siaj legitimoj aspiroj. Por defendo de ĝiaj rajtoj ili kreis sindikatojn, kies agado tamen devas esti singarda por ne trouzi siajn realajn fortojn kontraŭ la bono de la kolektivo mem. Kvankam strikrajto — deklaras la papo — estas agnoskita, ĝi povas aŭskulti la tenton trudi tro pezajn kondiĉojn por la ekonomio de la socia korpo, aŭ por postuloj nete politikaj. Kiam temas, aparte, pri publikaj servoj, necesaj al la ĉiutaga vivo de tuta kolektivo, oni devos nepre kalkuli la limojn, trans kiuj la danĝero kaŭzita fariĝus tute malpravigebla ». La dokumento renovigas la malaprobon de la diskriminacioj pro raso, deveno, haŭtkoloro, kulturo, sekso aŭ religio. La papo, memorigante la malfacilan situacion de la elmigrintoj, alvokas statutojn agnoskantajn rajton al elmigrado kaj al helpado de tiu suferplena homkategorio. Same li pledas pro la kreo de novaj industrioj pli kaj pli urĝaj pro la demografia problemo. kaj li admonas, ke peni solvi tion, per maltuzaj rimedoj, propagando de kontraŭkoncipiloj aŭ de abortoj estas malmoralaj kaj grave eraraj vojoj. La papo ne volas silenti pri la sociaj komunikiloj, kiuj fariĝis nova potenco, tre utila al la progreso, se bone uzitaj, male, tre danĝera. Pri la politika socio, li admonas, ke neniu modelo estas perfekta; pro tio oni devas ĉiam esplori kaj perfektigi ĝin, kun respekto al la rajtoj de la aliaj; kaj ke politika agado devas sin apogi sur la specife kritana bazo, la unika, kiu povas garantii sian efikon: amo kaj solidareco. Aparte li memorigas, ke ideologio marksista, ĝia sendia materialismo, kaj la liberala ideologio estis kaj estas kondamnitaj de la eklezio; kvankam oni devas distingi inter doktrinoj fiksaj kaj movadoj evoluantaj, en kiuj povas troviĝi pozitivaj elementoj. La papo admonas, ke la scienco, kiu hodiaŭ pli kaj pli progresas, nenian povos plene kontentigi. Ĝi pli arĝigas sed ne plenigas la homan menson. Nur la eklezio, kiu donas integran tutvidaĵon de homo kaj de

homaro donas ankaŭ helpon por kompreni la planojn de Dio kaj kunlabori kun li laŭ la ĝusta direkto. Ankaŭ la progreso ĉiam celita, neniam plene atingita, ricevas lumon el la kristana credo. La fina alvoko rilatas la taskon de la eklezio en la socia kampo, celantan ne nur orientigon de la spiritoj, sed ankaŭ impulson al agado por servo al la socio, esplorante ĉiujn eblajn konverĝojn por justeco kaj paco. Oni devas agnoski legitiman variecon de rimedoj. La sama kristana kredo povas indiki diversajn solvojn. Pro tio la Eklezio petas de la kredantaro klopodojn por la duobla tasko: disvolvi vigle kaj kuraĝe la sociajn strukturojn kaj adopti ilin al la veraj nunaj necesoj.

*El « Katolika Sento »*

---

## RELIGIAJ ARANĜOJ DUM LA UNIVERSALA KONGRESO EN LONDONO

Ne estas nia tasko raporti pri la tuta kongreso, la prelegoj, la ekskursoj, k. t. p.
Ni rimarkas nur tion, kio okazis rilate la religiajn aferojn.

**La solena inaŭgura Meso**

Dank'al la lerta kunlaborado de nia estrarano sin-ro N. Vigar, ni povis uzi la grandan kaj belan preĝejon de Kristo Reĝo en la Universitato. Mons-ro Kent ofte pruntedonas tiun preĝejon al kristanoj de aliaj kredkonfesioj; li tre volonte, kune kun pastoro Delaney, dekano de tiu preĝejo, akceptis niajn petojn. Ni ankoraŭ dankas ilin pro ilia grandanimeco.

Ok kuncelebrantoj (el ses diversaj landoj: Belgujo, Germanujo. Hispanujo, Hungarujo, Italujo kaj Tajlando) celebris la S. Meson, ie la kvara ptm de la dimanĉo, 1-a de Aŭgusto.

La ĉefcelebranto estis pastro Longoni, prezidanto de IKUE, predikon faris p. Thalmaier.

Pli ol 100 komuniantoj en la granda asembleo de 250 partoprenantoj, kiuj povis, per bone preparitaj flugfolioj, akompani la celebradon de la diservo.

Ankaŭ dum la tuta semajno, ĉiumatene okazis la S. Meseo en tiu preĝejo.

**Oficiala inaŭguro de Kongreso**

Multe da reprezentantoj, en nomo de multaj organizaĵoj, alportis mallongajn salutvortojn.
Nia prezidanto, siavice, eldiris:
Flanke de IKUE, t. e. de katolikaj esper-oj mi salutas ĉiujn kongresanojn kaj la estrojn de tiu tutmonda kunveno, kaj mi varme gratulas la organizintojn.
Membroj de IKUE partoprenas la U. K. ĉar ili deziras lerni ĉiam ion novan. Ni ne partoprenos nur la apartajn religiajn kunvenojn por pritrakti nur niajn aferojn. Sed ni klopodas lerni ion fortigantan nin en la esperanta sperto. Niajn rilatojn kun UEA ni intencas starigi kaj konservi lojalaj kaj simpatiaj.
Kie ajn troviĝas io bona, io vera, io bela, tie ni volas ĉeesti, ĉar tie estas fajrero de dia lumo, kiun ni alte taksas kaj amas. Tre simpatie ni rigardas la tutan mondon kaj la homojn je bona volo, ĉar la teraj realaĵoj ĉiam valoras kiam ili estas uzataj bone kaj sincere.

**Faka kunveno de IKUE** (la 4-an de Aùg. jex la 16-a)

Pli ol 50 IKUE-anoj el 14 landoj partoprenis nian kunvenon; prezidis pastro Longoni kune kun la estraranoj Vigar, Mudrak, Casanoves.

Nia kunveno — ekdiris la prezidanto — ne estas oficiala, do ni ne povas decidi ion oficiale en nomo de IKUE sed ni troviĝas ĉi tie por plibone interkonatiĝi, por aŭskulti unu la alian reciproke, por proponi ideojn, sugestojn. Ni povas programi nian estontan laboron, nian sintenon.

Oni povas diskuti pri la programo de nova prezidanto, kiun li mem verkis en la unua numero de la « nova » EK. Pastro Longoni legis ankaŭ leteron de s-ro Hoffman el Berlino, enhavantan multe da konsiloj.

Kiam la diskuto komencis, parolis Duranti, Kobor, Thalmaier, Mudrak Salzmans, Korytkowski, Vigar, Casanoves.

Duranti sugestis ne rompi rilatojn kun la antaŭaj redaktoroj de EK.

Kobor kaj Thalmaier parolis pri la disvastigo de esp.lingvo en nia eklezia medio.

Pri la karitagado estus bone — diris Salzmans — koni opiniojn de kristanoj de la tuta mondo laŭ la vidpunkto de loĝantaj en tiu lando, kie estas grandaj bezonoj.

Niajn roportojn kun Keli pritraktis Korytowski, kiu estas ankaŭ laboranta pri ekumenaj aferoj en siaj studoj por la diplomo.

Vigar opinias, ke se ni povus ĉiu-jare kongresi kun Keli, ni estus pli rapide efektivigontaj nian kunlaboradon. Li diris, ke por akiri unuiĝon kun ni kelke da protestantoj estas pretaj akcepti ankaŭ la Papan aŭtoritaton. La respektinda dekano mem de preĝejo de Kristo Reĝo (kie okazis la solena Meso) kredas je la reala ĉeesto de Jesuo en la Eùkaristio.

Vigar sugestis ankoraù pli oftan eldonon de komuna revuo IKUE-KELI. La saman sugeston donis pastro Casanoves.

Oni parolis ankaŭ pri la kongresoj. La venontan jaron (1972) ne tro multaj estos la eŭropaj esperantistoj tiel riĉaj, ke ili povas partopreni la U. K. en Portland. Ni opinias, ke multoj restos en Eŭropo.

La unua programo de IKUE estis kongresi en Italujo, en la mondfama urbo Como, apud la samnoma lako. Sed poste KELI proponis kunvenon en Francujo, en la Rochette, apud Parizo.

Nenio estas ankoraù certa, ĉar tiu loko ne havas sufiĉe da loĝejoj por la partoprenontaj.

Por la U. K. de 1973 oni parolis pri Beograd, en Jugoslavio. Kelke da ĉeestantoj sugestis starigi kunvenojn en la sama urbo de UK sed tri tagojn antaŭe, nur por niaj kristanaj aferoj. La kunveno estis, kiel intence, interŝanĝo de frataj sugestoj.

Ni malfermis la kunvenon, kaj fermis, per preĝoj.

**Oomoto**

Mi ne opinias, ke Oomoto estas vere religio. Mi legis broŝurojn pri tio, kiun Oomotanoj mem eldonis sed temas pri bona deziro de sincera kunlaborado de homoj al la paco, al la interna renoviĝo de la homo, al la sinkretisma ideo pri religioj, kies komuna programo estas la « spirito super la materio ».

Fakte s-ro Yoshimi Umeda, reprezentanto de Oomoto, estas ankaù sekretario de IRKE (interreligia organizaĵo).

Tamen ĉiu rezonado ne superas la nivelon de homa filozofio; religio, male, baziĝas sur la revelacio de dia vorto.

Ni ne povas taksi Oomoton kiel religion sed nur kiel filozofion.

**Interreligia kunveno**

Pli taŭge sukcesis la interreligia kunveno, kies temo estis « Religio kaj scienco. Kiel ambaù povos kontribui

por la progresigo kaj bonfarto de la homaro ».

Ni povas substreki ion bona kaj vera, kion oni diris en tiu kunveno, tamen ni ne povas kunsenti kun ĉiuj opinioj esprimitaj de la prelegantoj.

D-ro Schleicher asertis, ke scienco kaj religio ne povas kontraŭstari, sed lia opinio estas, ke ambaŭ havas la saman taskon por la surtera vivo, kaj ili baziĝas ambaŭ sur la samaj faktoj. S-ro Y. Isobe (japana) parolis pri Mondmessianismo, kiu estas nova japana religio de post la jaro 1947, kies simbola vorto estas **ĵorei;** ĝi uzas esperanton kiel religian oficialan lingvon sed ne mamulte diferencas de Oomoto.

D-ro I. Chiussi (itala) parolinte pri Islamo, esprimis sian timon pri la evoluo de la scienco se la religio ne gvidas ĝin. Ekz: la moderna tekniko portas nin al la nervaj malsanoj, al la frenezio. La atoma energio mem fariĝos pli forta ol la teknika de la homoj.

S-ro Braun parolis en nomo de liberpensuloj sed li ne diris ion rimarkinda.

S-ro Ivanov (bulgara) flanke de la « Blanka Frataro » substrekis la grandan bezonon de amo inter ni.

S-ro Brian Phillips (kvakero) ne akceptas la hazardan evoluo de la mondo sed kredas je la kreinta agado de Dio. Inter la ekstremismoj de materialistoj kaj de magiistoj, la vero estas meze sed, laù la skeptika opinio de Phillips, neniu konas la veron.

S-ro Umeda (japana) reprezentanto de Oomoto, diris ke la Azio estas la origina lando de religioj kaj de la monda civilizacio. La scienco, tute sola, povas, en duono de tago, detrui la tutan mondon; la konstruado de vera bono estas la renoviĝo interna de la homo.

S-ino Magnuszewska (pola) nome de Judoj, parolis pri la monoteismo; ŝia parolado, iomete konfuza, finis invitante ĉiujn al la laùdo de Dio per psalmoj 25, 122, 147-aj,kiujn la maliuna Hillel verkis je laŭdo de la Mreinto. Jelli Koopmans, presbiterino de KELI, ne povis ĉeesti por legi sian prelegon, kion legis en ŝia nomo, s-ino E. Otto. La revelacio estis la temo de tiu mallonga prelego. Dio faris revelacion per Jesuo Kristo.

La hungara pastro L. Kobor legis mallongan prelegon de s-ro J. Eder (Aùstria) flanke de religia opinio, tiel nomata « novarevelacio » sed, substance, filozofa maniero por klarigi kristanismon.

Li substrekis la originalan mesaĝon de Kristo, kaj akuzis la teknikon pro la konfuziga batalo kontraŭ la spiritaj bezonoj.

Fine, pastro Kobor ankoraù, sed en nomo de katolikoj, faris prelegon, kiun ni aparte aperigas (paĝ. 97).

**Nia komentario**

Mi ne opinias ke tiuspecaj kunvenoj estas tro utilaj. Unue: ĉiu partoprenanto revenas hejmen kun la sama ideo kiun li havis antaŭ la kunveno, kaj kredas esti sukcesinta propagandi sian ideon.

Due: oni traktas ofte pri filozofaj doktrinoj, devenitaj el religia sento, sed ne superantaj la nivelon de homa doktrino.

Religio estas vojo al Dio. Estas necese ke la vera vojo al la estonta vivo estu al ni indikata de iu, kiu bone konas tiun vojon; ĉu Dio mem, ĉu de Li elsendita homo.

La scienco pristudas la naturajn fenomenojn; la religio baziĝas sur la dia vorto por atingi la eternan vivon. Ambaù sendube helpas la homojn por plibone vivi, evolui, ne nur laŭ la sciencaj kaj teknikaj eltrovoaĵoj sed, precipe, laŭ la morala konscienco kiun la religio lumigas kaj direktas.

Kelke da prelegantoj ankaù parolis pri la scienco tiel kiel ĝi estus ĉiam senerara.

Sed la plej bona rezulto de la tuta

kunveno, ŝajnas al mi, estis ke ĉiuj substrekis la bezonon de la vera amo inter lo homoj kaj de la interna renoviĝo de la homo laŭ la spiritaj valoroj.

**La tria kunveno de IABO** (intern. Asocio de Biblistoj kaj Orientalistoj)

(la 6-an de Aŭg je la 11-a). Pli ol 60 personoj, inter kiuj sep katolikaj pastroj, partoprenis tiun tre interesan kunvenon.

La sekretario de IABO, pastro A. Duranti, raportis pri la agado de la pasinta jaro, pri la nova traduko de la Biblio en Esperanton kaj petegis kunlaborantojn al tiu granda verko. Li anoncis malĝoje ke la d-ro Rust mortis kaj lasis biblian vortaron, tre valora verko, sed, bedaŭrinde, post lia morto oni plu ne trovis tiun tre gravan vortaron.

D-ro Italo Chiussi parolis pri la ekzegezo de la Sankta Skribo ĉe la Islamo. Islamo kredas je la kreanta ago de Dio, je la monoteismo, je la profetoj kiujn Dio sendis al la hamaro (inter kiuj ankaŭ Jesuo Kristo kaj Masometo), je la vivo post tiu surtera vivo.

Ideoj pri naturo kaj supernaturo, scio kaj kredo, korpo kaj animo, R. t. p. ne estas kontraŭstarantaj sed nur diversaj vidpunktoj de la sama realaĵo. Islam ne kredas je la diablo kiel reala persono.

Pri la estonta vivo, post la morto, oni kalumniis ĝin, propagandante kiel materiale plezura vivo sed, fakte Islamo kredas je vivo tiel elstaronta kiel nek okulo vidis nek orelo aŭskultis, nek menso povas imagi. Islam ankoraŭ nomas Dion pacema, kompatema, konsolema.

Pastro Thalmaier bone prelegis pri la antiqvaj dokumentoj enhavantaj tekstojn de la Sankta Skribo.

Nome, li parolis pri la papiruso p. 52, konata kiel codex Sinaiticus, eltrovita de K. Tischendorf en la jaro 1859 kaj enhavanta frazojn de la ĉapitro 18-a de Johano.

**Ekumena kunveno** (IKUE-KELI)

la 6-an de Aŭg. je la 14-a.) Prezidis kune pastro Longoni (IKUE) kaj s-ro Murray (KELI).

Post malmulte da enkondukaj vortoj diritaj de pastro Longoni, s-ro Vigar legis la unuan ĉapitron de Johano (1-14) kaj s-ro V. Grahn (sveda keliano) parolis pri la evangelio en sekulariĝinta mondo.

La realaĵo de mondo sen Kristo estas terura; la junuloj evitas tiun realaĵon, refuzas ĝin kaj uzas drogon por forfuĝi en alian realaĵon. Nur la Evangelio taŭgas doni al la homaro idealan kialon por vivi.

S-ino E. Farkas (hungara kelianino) sugestas aperigadon de artikoloj prezentontaj la problemoj laŭ la urĝaj bezonoj de la homoj. Ekzemple, la hungara junularo pli profunde volas koni la personecon de Jesuo Kristo.

S-ro Tozer (brita ikueano) plendas ke la preĝejoj estas plenaj pli da virinoj ol da viroj, pli da maljunaj ol da junaj fideluloj, pli da tristvizaĝaj ol da ĝojaj partoprenantoj.

S-ro Murray asertas ke la disvastigado de la Evangelio ne devas esti nur afero de predikantoj sed zorgo de ĉiuj kristanoj, kiuj ne nur la dimanĉon, sed en la tuta vivagado devas esti misiistoj per sia edifa sinteno.

La duan parton estus devigata plenigi pastro A. Marky (hungara ikueano) je sia prelegado. Sed li devis subite forveturi matene.

Anstataŭis lin la samlandano pastro Kobor, parolante pri la esperanta lingvo kiel granda ilo per nia kristana unueco. Laŭ la deziro de Papo Johano XXIII-a, ni serĉu tion, kio nin ligas, ne tion, kio nin disigas. Citante ekzemplon el la hungara lingvo, li diris, ke la frazo « batali inter si » estas tradukenda, en sia lingvo, « ne kompreni reciproke unu la alian. » La interkompreno, do estas je pli necesa des pli ni volas realigi nian unuecon. Post kelke da demandoj, oni konkludis per komuna preĝo, recitante la « Patro nia ».

# JEN LÀ PRELEGO DE P. KÒBOR DUM LA INTERRELIGIA KUNVENO

Temo: Religio kaj Scienco.
Kiel ambaŭ povos kune kontribui por la progresigo kaj bonfarto de la homaro?

Prelegis el Katolika Eklezio: Sac. Ludoviko Kóbor el Hungarujo.

Kiam la astronaŭtoj ĉirkaŭvojaĝis la lunon, kaj denove estiĝis radiokontakto al la tero, ilia voĉo audĵĝis tra la etero: « En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron ». Poste Borman komencis preĝi al Dio, ĉar la humila homo eĉ sur la supro de l'teknico kaj scienco levas sian animon al Dio. La religio estas rilato inter homo kaj Dio.
La scienco estas malkovro de l'sekretoj, kiujn la homo ne povas fari, sed nur malkovri. Sed per la granda dia donacaĵo, — kiu estas la intelekto — tiujn varias, disigas kaj kunmetas.
Sed ĉu povus la scienco progresigi la homaron sen religio? Eble jes. Sed ĉi tiu progreso ĉi estus je la bono de ĉiu homo? Multaj havas ja la benojn de la sciencoj, tamen multaj malsatas kaj mizeras.
Ni nur tiam povas diri: « je la progreso de l'homaro », se ĝi rilatas al ĉiu homo.
Ni ĉiuj scias, ke en la pasintaj jarcentoj la monaĥoj kulturis la sciencojn. Mi nur mencias unu nomon, tiun de Mendel. Li komencis ellabori la geneologion. Krome, nun la misiistoj estas unuavice kiuj transdonas la atingaĵojn de la sciencoj al la ĝis nun primitivaj popoloj.
Oni diras ofte, ke la religio bremsis la evoluon de la sciencoj, kaj tiel de la progreso. Ni ne prijuĝu la antaŭulojn. Ili ja ne konis tiom multe el la mondo kiel ni. Ili havis la eblecon rigardi la Biblion tra tiuj vivkonceptoj kiujn ili havis. Ne la Biblio bremsis la sciencojn, sed la homa primitiveco. Nu kaj eble timoj de unuopaj homoj.
La religio donis forton al la plej grandaj esploristoj, elteni ĉiujn malfacilaĵojn. Vivi eĉ en malhonto, en mizero, tamen laborante je la bono de homo. Tiel ekzemple Penicillin.
Heizelberg, Nobelpremiito, la plej granda fizikisto de nia epoko, estas konata kiel konvinkita religiano; rilate eĉ al mondkoncepto.
Nomo de Plank estas konata. Mi citas lin: « Inter la religio kaj scienco nenie ni trovas kontraŭecojn, eĉ des pli: tutan kongruon en la grandaj demandoj. » Albert Einstein diris: « La religio estis tio, kio sur ĉiu tereno helpis la homaron al la progreso. »: « La scienco sen religio estas paralizita, sed la religio sen scienco estas blinda! »
Mi ne povas preterlasi la nomon de Takasi Nagai, kiu havis fortan kredon al Dio, kaj tiu kredo instigis lin en la plej teruraj momentoj, kiam la atombombo detruis urbon Nagasaki, fari ĉion por la savo kaj helpo de mizeruloj.

Sed ĉu simplaj homoj, homoj religiaj kiel ni, ĉu ni kiel povus antaŭenigi la progreson de la homaro? Unuavice: Ni laboru sur la tereno de sciencoj. Due: ni havu ne egoistan amon. Tiun neegoistan amon ni ĉiuj ĉerpas el la amo de Dio. « La Kredo sen ago estas morta » (S-ta Paŭlo). Ni devas kunlabori por la bono de ĉiuj mizeraj homoj. Mi povas mencii grandajn tiajn rezultojn en la kristana mondo. La agadoj « **Mizereor** kaj **Adveniat** kolektas multe da monoj, kaj tiel la diversaj kristanoj kunprenas la fortojn por antaŭnigi, progresigi la mizerantajn homojn. La diversaj religioj devas kunpreni la fortojn, kaj tiel ni povos progresigi per la helpo de scienco, — sed la ilo estas la dia amo en ni, — per tiu ni povos servi la progreson kaj la bonon de ĉiu homo sur la tero.

## NI PREĜU, DUM LA JULIA MONATO LAŬ LA PAPA INTENCO

**Por, ke la kristanoj kontraŭstarigu, al la pli grandiĝanta malĉasteco, spiritajn valoraĵojn per vortoj, kaj per vivaj ekzemploj.**

Filmoj, ĵurnaloj, teatraĵoj k. t. p. estas perantoj de ĉiam disvastiĝanta senmoraleco.
La nuntempa sociala medio, tute klopodanta je la facila mongajno, akiras sian celon per konsumaĵoj kiuĵ plaĉas al la aĉetontaj (spektatoroj, aŭdantoj, legantoj), kaj tiklas la plej malaltajn homajn inklinojn.
Ni trofacile forgesas la realecon de la peko (je la originoj de la homaro) la viglan kontraŭbatalon en ni inter la laŭkarnaj inklinoj kaj la dia graco.
Mi ne intencas, nun, longe paroladi pri tiu afero; verŝajne oni aŭskultus min ne troplezure.
Nur al Kristo ni turnu nin, al Lia surmonta parolado, al Liaj beatecanoncoj, kiam li ordonis al ni ne rigardi virinon kun malĉasta intenco.
Nur Kristo, kaj Lia Evangelio, estas kapablaj ŝanĝi la homajn korojn, kaj doni novan spiriton, kaj novan aspekton al nia socio.
En nia praktika vivado oni vidiĝu Kristo, kaj Lia doktrino; sekve la homa komunumo pliboniĝos.

*F. L.*

---

## PORNOGRAFIO

Pornografio ankaŭ en Italujo daŭre plivastiĝas. Estas ja vere, ke la artik. 21-a de la itala konstitucio agnoskas al ĉiu la rajton manifesti libere siajn pensojn buŝe, skribe kaj per ĉiu alia komunikilo, sed ĝi ankaŭ deklaras, ke estas malpermesataj prespublikaĵoj, spektakloj kaj aliaj manifestacioj kontraŭaj al la bonaj moroj; kaj la artik. 529 de la puna kodo precizigas, ke oni konsideras obscenaj « agojn kaj objektojn, kiuj laŭ la komuna sento ofendas pudoron ». Sed estas tre malfacile difini la komunan pudorsenton. Pro tio ne estas mirinde, ke juĝisto de iu urbo kondamnas, ekzemple la saman filmon, kiun juĝisto de alia urbo permesas.
La Papo kaj la italaj episkopoj kaj la episkopoj de multaj aliaj nacioj admonis la kristanojn kontraŭ la malĉasteco.
Antaŭ malmultaj semajnoj la Papo diris al la fideluloj konvenintaj en la placon de S. Petro: « Ankoraŭ unufoje, karaj gefiloj, ni devas esprimi nian zorgon kaj ĉagrenon pro la atakoj de la malĉasteco, kiu ĉirkaŭas nin kaj volus persvadi nin, ke neniu malbono estas en la malmodereco, kiu penetras ĉien: en librojn, spektaklojn, edukadon, vestojn, morojn... »

# LA LEGANTOJ SKRIBAS

**Dr. Kondor el Lampertheim**

Tre est. Pastro Longoni, ambaŭ viajn EK-numerojn mi orde ricevis kaj kore dankas vin. Samtempe mi gratulas al via elekto al Prezidanto ankaŭ en la la nomo de s.ro Paŭlo Balkányi el Budapest, kiu estas mia bona veterana amiko (evangelia). Al li precipe plaĉas la programo en Nr. 617 pri la ekumena celado kune kun KELI...

**Walter Mudrak**

Mi ĝojas, ke vi presigis mian opiniesprimon rilate al IKUE kaj la spirito de S. Francisko, ankaŭ mi konsentas akcenti tion, kio nin kunigas. Kontente mi konstatis, ke IKUE ankaŭ nun daŭrigos la ekumenan celadon....

**E. Paesmans el Antwerpen**

Mi estas tre kontenta, ke E. K. reaperis, kaj mi gratulas vin pro la nova tasko en nia katolika movado. Mi deziras al vi multan sukceson kaj esperas ke nia movado progresu sub via estrado.....

**A. F. Marszalkowski el Gdansk** (Pollando)

Kara frato en Kristo! ĵus antaŭhieraŭ atingis min la nova numero de EK. Multan dankon, sed mi tre ĝojus, se mi povus regule ricevi nian revuon... Mi esperas trovi en la venontaj numeroj pli da edifaj artikoloj, speciale bazitaj sur la sankta Skribo kaj sur la papaj dokumentoj. La celo de nia revuo ja estas peri dian Vorton, peri la « bonajn novaĵojn » al la mondo. Aranĝu la revuon, tiel ke en ĝi estu neniu preseraro: necesas bona korekto....
Mi gratulas al vi pro via elekto, ŝajne tia estis la Dia volo, nun necese estas serĉi la Dian vojon por nia agado...

**Karl Dürrschmid,** landestro por Karintio kaj komitatano de IKUE:

Tre estimata s.ro Prezidanto! Elkoran dankon pro la unua numero de la itala periodo de IKUE, kiu per la graco de Dio sukcesu reunuigi la membraron de IKUE en paca kunlaborado, por la alta celo de la katolika esperantmovado kaj tamen ne malatentu la ekumenan kunlaboron kun la aliaj kristanaj konfesioj.

Pro la unua numero oni devas gratuli al vi, ĝi monstras vian programon, estas bele presita, malgraŭ kelkaj preseraroj, kiuj certe en venontaj numeroj ne plu estos.

Kaj, antaŭ ĉio, ĝi estas paca.

Mi tre esperas, ke ankaŭ la malvenkintoj reveńos al kunlaborado por la komuna celo. Do mi deziras al vi elkore plenan sukceson...

**Jeanne Bonjour** el Lausanne

Tre esimata Prezidanto! ĉar nia Papo Paŭlo tiel bezonas la fidon kaj amon de ĉiuj kredantoj katolikaj, mi ege ĝojas pro via elekto kiel prezidanto de IKUE. Lasttempe mi preskaŭ ne kuraĝis malfermi EK pro la malpacaj ironiaj artikoloj.

Oni skribu simple, rekte, ne dusence. Tio estas mia deziro, nia deziro....

**Germano Gimelli** el Bologna

Mi forlasis IKUE'n antaŭ iuj jaroj, kiam mi konvinkiĝis ke EK jam nenion aperigis « katolika » sed nur atakoin al la Papo, al la Eklezio, al la Episkoparo kaj al ĉio, kio estas katolika romana. Nun mi estas preta... reveni en la ŝafejon.

**La Itala bulteno « Katolika Sento »**

**Espero Katolika** aperigis en Julio la unuan numeron (4-5) de la nova redakcio. Ĉar ni atendis ĝin senpacience kaj scivoleme, ni salutis ĝoje, kaj avide ni tralegis ĝin. Kiel programa

numero ni ne miras, ke ĝi ŝajnas unuaspekte severa; ĝi ne povis montri tuj sian plej belan veston. Oni perceptas la prisilentitajn malfacilaĵojn de la abrupta redakcia aliiĝo. Krome foliumante la paĝojn, nin trafis ankaŭ diversaj pres — kajlingv — eraroj. Ni estas komprenemaj: certe la sekvontaj numeroj pliboniĝos ĉiurilate. Tamen ĝi havas ankaŭ pozitivajn poentojn. Unue, ĝia klara programo, kiu ne volas allasi dubojn pri fideleco al la nova linio. La respondeca komisiono estas ĝia grava garantiaĵo. Plue, ekde la unua paĝo ĝi celebras Marian; ĉi tio jam certigas nin pri la ĝusta starto. Ankaŭ la tipografia aspekto ŝajnas al ni rimarkinda pliboniĝo, satinda la varieco de la karakteroj, kompare al la rimedoj ne ĉiam feliĉaj de la pasintaj numeroj. Tre oportune la revuo donas la portreton de la nova prezidanto kaj lian alvokon. Ni opinias, ke la multaj,kiuj ĉagreniĝis pro la antaŭa sinteno, nun povas ĝoji kaj redoni sian plenan fidon al IKUE. Nu, se ili deziras belan revuon, ili ja scias, ke la plej rekta vojo estas havigi helpe al ĝi abonojn kaj bonajn artikolojn.

**Alberto Eiiti Minami (Japanuio)**

Japana nova religio « Oomoto » alprenis Esperanton. Ĝi eldonis Esperantajn librojn kaj gazetojn. Por la evoluo de Esperanto en Japanujo, oni ne povas forlasi « Oomoto ».

★ — — — — — — — — — — — — ★

La respondeca komisiono de IKUE sendis la unuajn kajerojn de la nova EK al 1600 adresoj: al Italujo, Ĉeĥoslovakujo, Germanujo, Usono, Nederlando, Hispanio, Francujo, Aŭstrujo, Pollando, Hungarujo, Svislando, Anglujo, Belgujo, Kanado, Litvovjo, Brazilo, Nova Zelando, Arĝentino, Romanio, Portugalo, Skotlando, Svedujo, Koreo, Israelo, Urugvajo, Madagaskaro, Formosa, S. Domingo, Irlando, Popola Ĉinio, Suda Vietnamo, Malto, Kongolando, Meksiko kaj en aliejn landojn.
Ni atendas la rezultojn.

★ — — — — — — — — — — — — ★

— — — — — — — * * — — — — — — —

## UTILA KAJ KARITA INTERŜANĜO.

Niaj slovakaj samideanoj ne povas sendi monon pro sia abonkotizo ekster sian landon. Ili oferas al ĉiuj samideanoj de la tuta mondo multajn aĵojn por egaligi la abonojn. Interesuloj (ni esperas, ke estos multaj la okcidentlandanoj, kiuj volos helpi ilin) mendu rekte librojn aŭ aliajn proponitajn aĵojn al nia kasisto, s-ro Sherer-Graber, kiu konigos la adresojn de interesuloj kaj la menditan aĵon al la estraro de slovakaj samideanoj. Scherer mem povas respondi al la mendintoj, kiamaniere oni povas pagi. Jen la listo de proponitaj libroj, diskoj kaj pupoj:

Interesa legaĵo (internacia legolibro)
p. 124 ned. guld. 3
Libro de apokrifoj (Capek-Vondroušek)
p. 110 ned. guld. 2,80
Sileziaj kantoj (Bezruĉ-Korinek)
p. 124 ned. guld. 2,80
Estrado de animaloj (Jakubcová)
p. 110 ned. guld. 3,10
Invito al CSSR (ilustrita gvidlibro)
p. 100 ned. guld. 3,=
La mondo rakontas (Kilian, legolibreto)
p. 48 ned. guld. 1,60
Paŝoj al plena posedo (Auld, legolibro)
p. 240 ned. guld. 5,=
Junulara kantareto (Cink, kun melodio)
p. 46 ned. guld. 1,=

Ni povas liveri ĉiujn librojn en eldonitajn en socialismaj landoj, gramofondiskojn kun kristnaskaj kaj folkloraj kantoj operoj, folklorajn aĵojn, pupojn en naciaj kostumoj, landajn suvenirojn.
Ne estas malapuda la tempo de kristnaskaj donacoj; preparu ilin ĝustatempe. Ni faros samtempe grandan donacon al niaj slovakaj fratoj.

## GEJUNULOJ!

Deziras korespondi kun vi
Stefan Furdek, deksepjara fraŭlo, pri muziko (orgeno, akoredono, klarneto) libroj, filmoj, sporto.
Lia adreso: Hybel 665, TRSTENA, dis. Dolny' Kubìn,, Ĉeĥoslovakio

# EKUMENAJ INFORMOJ

*Nova ekumena asocio en Basileo.*

Nova ekumena asocio, nomata « Laborkomunio de la svisaj kristanaj Eklezioj » estis fondita dum kunveno, kiu okazis en la historia salono de la basilea ekumena Koncilo. Partoprenis reprezentantoj de la evangeliaj svisaj eklezioj, de la evangelia-metodista eklezio, de la unuiĝo de la baptistaj komunaĵoj kaj de la katolika eklezio, kies reprezentantoj estis la episkopoj Vonderach, Haengi kaj Mamie.

Taskoj de la nova asocio estos: la defendo de la komunaj kristanaj valoroj kontraŭ la publika opinio, la promovado de teologiaj diskutoj kaj de reciprokaj konsultoj, la starigo de laborgrupoj en ĉiu kantono, interŝanĝo de informoj....

*Ekumena cerimonio en Lima.*

Okaze de ekumena renkontiĝo pri la problemoj de la kristana edukado okazis en Lima religia ceremonio, kiun partoprenis katolikaj, evangeliaj kaj ortodoksaj ekleziuloj. La ĉefepiskopo de Lima, kard. Landazuri Ricketts, dum sia parolado substrekis la grandan utilon de tiu ekumena kunveno.

*Ekumena ceremonio en granda tombejo.*

Dum la somero ĉiun mardon multaj germanoj venas el la apudaj vilaĝoj (Garda, Bardolino, Torri ktp.) kaj kune partoprenas la ekumenan ceremonion (ökumenische Andacht) en la granda milita tombejo de Costermano. Ili kantas kaj preĝas kune, aŭdas la predikon, kiun katolika aŭ evangelia pastro alterne faras.

*Filmo de protestanto pri Papo Johano XXIII.*

La kanadano Alston venis en Romon, kie li realigos filmon pri Papo Johano XXIII. Alston, kiu estas prezidanto de kinematografa asocio, laboros kune kun katolika pastro.

*Anglikanoj vizitas la sanktejon de Compostella.*

Je la fino de julio anglikana pilgrimgrupo vizitis la tombon de la apostolo Jakobo en Compostella (Hispanujo). Gvidas la pilgrimantojn la kanoniko Roland Baron, membro de la konsilo de la Angla Eklezio por la ekumenaj rilatoj.

*Luteranoj kontraŭ la rasismo.*

Du luteranaj eklezioj en Sudafrico kontraŭmetis sin al la rasista politiko de la « apartheid ».

## EL NIAJ LANDAJ ASOCIOJ

### « La afero Jägerstätter » — Pli bona kristana Televid-Prezentajo

Kiel plej bona kristana televid-prezentaĵo 1971 estis distingita en la Dua Internacia Kristana Televid-Semajno en Baden-Baden, Federacia Respubliko Germanujo, « La afero Jägerstätter » (« Der Fall Jägerstätter ») dokumenteca, ludo, farita en komuna produktado de Osterreichischer Rundfunk (Aŭstria Radio) kaj Zweites Deutsches Fernsehen (Dua Germana Televido).
La dokumenteca ludo estis scen-aranĝita de Axel Corti laŭ la scen-libro de Helmut Andics kaj monstras la historion de la modesta kamparano, familiestro, patro de tri infanoj, el St. Radegund, vilaĝo en Supra Aŭstrujo, kiu prefere mortis ol ke li soldatiĝis en la Hitler-milito.
Li ne trovis kunigebla kun sia kristana konscienco, sekvi la ordonon al soldatiĝo en la armeo de la « Tria Regno » (al kiu Aŭstrujo tiam, kontraŭvole, apartenis) Li mortis je la 9a de aŭgusto 1943 en Brandenburg, Germanujo, kiel martiro de la konscienco, kiel atestanto kristana kontraŭ perforto kaj maljusta milito.
Lia vidvino ankoraŭ vivanta, povis kontribui klarigajn informoin ĉe la produktado de tiu vere konsiderinda verko, samtempe moderna « akto de martireco », same honoriga por Aŭstrujo kaj por la kristana religio. La martire mortinta firmkonvinka viro estis modela ano, filo de la katolika eklezio, kvankam ankaŭ ties tiamaj superuloj ne ĝuste taksis lian pioniran kuraĝan agon. Sed li suferis ankaŭ tion humilece kaj vere kristansente. — Menciita unika Televid-Filmo estos prezentata en Aŭstria Televido je la 26a de oktobro 1971, je la Aŭstria Nacia Festotago.

**W. Mudrak, Wien**

## NI GRATULAS

La 9-an de septembro 1971 frato Walter Ludin sacerdotiĝos.
Lia sankta konsekro okazos en la kapucena preĝejo de Sursee (CH).
Ni bondeziras al li ĉion bonan gratulante lin tutkore.

# AKLE en kadro de AEF, Wien

**Ni funebras.**

La nombro de nia anaro, precipe de niaj s-anoj pastroj, en la eterna mondo vere jam estas konsiderinda. Precipe en la lasta tempo ni tion denove spertis: Mortis en junio 1971, do ĉijare, tri el niaj fidelaj multjare fervoraj sacerdotoj-esperantistoj.

✠

Ni profunde funebras pri la morto de p. m.

P. Georg Plank, komandoro de la Ordenò de la Kruc-kavaliroj (O. Cr.) kun la ruĝa stelo em. paroĥestro de Sta. Karlo Boromeo, Wien - IV, en sia 85a vivjaro. Preskaŭ 60 jarojn li estis ankaŭ konvinkita esperantisto: Jam 1914, antaŭ estiĝo de la unua mondmilito, li faris Esperanto-predikon okaze de la tiama Tutaŭstria Esperanto - Kongreso en Franzensbad (Ceĥosl., tiam apartenanta al Aŭstrujo - Hungarujo) kaj en la sekvintaj jardekoj ĉiam estis helpema kaj agema por nia afero, i. a. okaze de la IKUE-Kongresoj 1924 kaj 1958 en Vieno, ankaŭ ĉe la UK tie pastre prizorgis nian Aŭstrian Katolikan Ligon Esperantistan (AKLE), kiu solene partoprenis lian 50 jaran sacerdotan jubileon, 1960, kaj travivis lian valoran kontribuon ĉe la 50-jara jubileo (de AKLE) en Vieno, 1962. Li ankaŭ ĉiam montris intereson kaj subtenon por la generala afero de Esperanto kaj ĝuis rekonon kaj taksadon en la landa organizo, do en Aŭstria Esperantista Federacio, kies honorprezidanto reg. kons. R. Cech dediĉis dignajn vortojn de memoro ĉe lia tombo (la enterigo okazis ja la 24a de junio t. j. sur la Centra tombejo de Vieno). Aliĝas nia anaro, memorante, preĝante, ankaŭ en tuta IKUE, kie li siatempe ankaŭ vigle partoprenis i. a. en diversaj IKUE-kongresoj (Nürnberg, 1923, Wien, Prago ktp.). Lia ekzemplo estu por ni instigo kaj insipro, devigu nin al plua oferema agado.

✠

Je la 19a de junio t. j. forlasis nin p. m. prelato Karl B. Thalinger, 87-jara, em. paroĥestro de Gars a. Kamp (Malsupra Austrujo), kaj ankaŭ dekano de la dekanujo Horn. Ankaŭ li estis servanto de la esperantista afero dum preskaŭ 50 jaroj. Ankaŭ al li estu danko kaj memoro kaj nia pia preĝo-dediĉo!

✠



Kaj je la 27a de junio 1971 mortis en Graz p. m. P. Pius Lenz, OFM CAP. 81-jara. Ankaŭ li estis efektive pioniro de nia katolika Esperanto-afero kaj i. a. kunfondinto de la iama Katolika Esperanto-Grupo Emil Peltier en Graz. Partopreninte la 12an IKUE-Kongreson en Assisi, 1927, li estis tiel forte tuŝita da tiu loko de vivo agado de S. Francisko, ke li decidis, elekti ankaŭ tiun vojon de la sekvado al Kristo, kaj li fariĝis kapuceno en la sama jaro. Gis lia vivofino li servadis kiel hu-

mila « filo » de la granda sanktulo serafika.

En la daŭro de la jaroj li ankaŭ kelkfoje faris Esperanto-predikojn okaze de kongresoj aŭ similaj esperantistaj aranĝoj.

Ankaŭ lia ekzemplo estu por ni daŭre rememorinda kaj konsiderinda. Niaj preĝoj akompanu lin en la eterna mondo.

**W. M.**

## El Francujo

**La katolika diservo en Lyon.**

Dimanĉon, 11-an de aprilo 1971, dum la nacia kongreso, je la 18-a, okazis katolika diservo en la kripto de la baziliko d'Ainay.

Pli ol cent kongresanoj partoprenis la meson, celebratan de Kanoniko Cote. Tiu pastro, **zona** esperantisto, estas blindulo. Tiel la partoprenantoj estis vere kortuŝitaj, kiam Kanoniko Cote kvankam ne vidante la terajn aĵojn, montris al ni la ĉielajn realaĵojn. Ankaŭ substrekinda la fakto, ke blindulino per brajla materialo legis la tekstojn de unua parto de la meso.

Ĉiuj partoprenantoj unuanime dialogis kun la mesoferanto kaj tutkore kantis. Ankaŭ rimarkinda la ĉeesto de kelkaj amikoj Protestantoj.

R. D.

## ORDINARA PARTO DE LA MESO.

**Ni promesis, ke ni publikigos en tiu ĉi numero la ordinaran parton dt la Meso por la celebranto. Multe da duboj ekstaris pri la bonstila formo de la teksto kaj tial ni volas antaŭe klarigi malhelajn punktojn.**
**Al pastroj, kiuj deziras la tekston, ni povas sendi la nune uzitan flugfolion.**

## ANONCETOJ.

La sekretario-kasisto S.ro Scherer komunikas:
mendu librojn, diskojn, pupojn ktp. rekte al s.ro A. Berka (Na harazi, 1423 Vsetin - Ĉeĥoslovakujo, kaj pagu rekte al la kasisto (Sherer), t. e. al la centra kaso en St. Gallen (banka konto 725, postĉeka konto 90-636) nepre kun la mencio « ĉeĥa libro ».

* * *

La abonkotizo por la revuo EK ne estas taksebla en dolaroj, ĉar ili estas nun tre oscilantaj. Estas pli bone taksi la kotizon en svisaj frankoj: t. e. 13,5 sv. fr. korespondantoj al ĉ. italaj L. 2.000. Oni povas pagi sur la menciita konto en Svislando aŭ al la nacia peranto per egalvalora sumo.

Oni deziras ke la naciaj reprezentantoj komuniku siajn kontojn bankajn aŭ poŝtajn, por ke ni povu publikigi ilin kaj tiel faciligi la pagojn al iliaj samlandanoj. Ni publikigos ofte la liston de la naciaj reprezentantoj kaj faciligos la financan movadon.

**Rajtigo de la tribunalo de Milano n. 208 (27 majo 1971)**

**Respondeca direktoro: Longoni Ferdinando**
**Via s. Ambrogio 2 - Tel. 9960050 - I - 20051 Limbiate (MI)**

**Presejo: Soc. Tipo-litografica G. e M. Bigliardi - Via Tana 18 - I - 10023 Chieri (TO)**

**Ekspedo per poŝtabono - Gr. III/70 - Supplemento al n. 8-9 de « Lungo la via »**